



Monata revuo
Maandellijs tijdschrift

10a Jarkolekto n-ro 2
februaro 1990

Estraro

Monique Caestecker, prezidanto, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge,
☎ (091) 57 63 84.

Edward Symoens, vicprezidanto, Putsesteenweg 131A, 2180 Kalmt-
hout, ☎ (03) 666 62 66.

Ivo Durwael, sekretario, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem, ☎ (03)
440 30 92.

Roland Rotsaert, financoj, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, ☎
(050) 33 00 04.

Alex Humet, instruado, van Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem,
☎ (03) 239 21 69.

Jos Vandebergh, eksteraj rilatoj, Ambachtstraat 39, 3538 Hout-
halen, ☎ (011) 52 19 43.

Komisiltoj

Financoj: Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.

Eldonoj: Alex Humet, Paul Peeraerts kaj Chris Declerck (Amerika-
lei 135/2, 2000 Antwerpen)

Manlibro de la aktivo: Marc vanden Bempt (Duisburgsestraat 12,
3030 Heverlee, ☎ (016) 20 14 53.

Gazetara servo: Guido van Damme (FEL, Frankrijklei 140, 2000
Antwerpen, ☎ (03) 234 34 00).

Rebata servo: Germain Pirlot

Prelegvojaĝoj: Hilde van Ingelgem (Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst,
☎ (053) 70 50 11).

Oficejo

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Malfer-
ma ĉiun labortagon de 9.00 ĝis 12.30 kaj de 13.30 ĝis 17.30 h.
Telefono (03) 234 34 00. Telekopililo: (03) 233 54 33.

Estrarkunsido 90 02 17

1. **Ĉeestas:** Ivo Durwael, Roland Rotsaert, Paul Peeraerts, Edward Symoens, Alex Humet kaj Jos Vandeborgh.

1. **Antaŭa protokolo:** Akceptita.

2. **Financoj kaj oficejo:** Pro la longa foresto de la librotenistino, la finaj ciferoj de 1989 ne jam estas konataj. Ĉar oni antaŭvidas pli-malpli nulan saldon, decidite estas amortizi la jam delonge pendantan dubindan debitoron „TK/Stafeto”. Pro malsano plurmonata de la grafikisto, multaj temporabaj laboroj ankoraŭ restas nefaritaj (Kuirlibro, Esperanto-gramatiko, Fundamento sub lupeo, ktp.).

La jaro 1990 komenciĝis tre malbone. Difektiĝis pluraj maŝinoj en la unuaj semajnoj de la jaro: tranĉmaŝino, komputila ekrano, tajpiloj, vinktomaŝino, respondaparato, reprokamero... La riparkostoj sumiĝas ĉ. 200000 frankojn. Aliflanke la grafikaj laboroj kaj la abonoj por „Monato” ŝajne kreskas, kvankam ne jam haveblas la ciferoj por pruvi tion.

Decidite estas en 1990 aĉeti duan, lasertipan, kompostmaŝinon. PP mem decidu kiam estas la oportuna momento por financi kaj install ĝin.

3. **Subvenciado al la grupoj:** Pro la ŝanĝoj en la subvencia sistemo de la ŝtato, la estraro proponas ke FEL subvencios la grupojn aliĝintajn al FEL per fiksa laŭhora sumo por ĉiu pruvita kurso aŭ eduka aktiveco kiu okazas en 1990 aŭ poste. Krom tio kompreneble FEL povos ankoraŭ doni kromajn subvenciojn por specialaj ambiciaj elstaraj projektoj. Pro la fakto ke la ŝtato elpagas siajn subvenciojn ĝenerale du jarojn post la okazintaĵo, ankaŭ la grupoj ricevos siajn rekompencojn nur post tiu tempo. La kotizsistemo restos senŝanĝa. Pllajn informojn pri tio la grupestroj povos ricevi dum la ĝenerala jarkunsido de FEL la 10an de marto.

4. **Eŭropa kongreso 1991:** Multaj landaj asocioj ne respondis al la alvoko komune kongresi. Germana Esperanto-Asocio kurvenos aparte en Munkeno. Ŝajne B, NL, L kaj F interesiĝas pri komuna aranĝo. Pri tio okazos preparakunsido en marto sub la gvidado de Claude Nourmont.

5. Helpo al Rumanio: Kelkdeko da Rumanaj esperantistoj jam ricevis helpon de FEL en la formo de libroj kaj/aŭ abonoj. Personoj kiuj ricevis novaĵojn de Rumanaj esperantistoj post la revolucio estas petataj skribe sendi tiujn adresojn al FEL. Kiu povas donaci iom da mono por povi pagi la ekspedkostojn, ĝirution al konto 402-5510531-55 kun la mencio „Donaco Rumanio”. Donacoj de 1000 frankoj aŭ pli estas subtraheblaj en la impostdeklaro.

6. Faldfolio Green: Estos eldonita kune kun Nederlando. Ili jam liveris tekston kaj kompostos. FEL presos.

7. Prelegvojaĝo Werdin: Ne povos okazi.

8. Vojaĝoj al Kubo: Ni ĵus ricevis kelkajn interesajn proponojn pri flugoj al Kubo (kaj reen...) tra Budapeŝto. Kiu jam aliĝis ĉe FEL por la Kuba kongreso kaj kiu petis informojn pri la vojaĝeblecoj, baldaŭ ricevos cirkuleron kun prezoj kaj ĝustaj donitaĵoj.

9. Vojaĝoj al Hungario: Ankaŭ pri tio alvenis iom da tre interesaj proponoj. La estraro opinias ke ili ne jam sufiĉe maturas. PP pluesploros.

10. Instrutago: Vidu raporton en tiu ĉi numero.

11. Memoriga listo por budprizorgantoj: PP ankoraŭ ne sukcesis trovi tempon por verki tiun listeton.

12. Grupo Mortsel: La Esperanto-grupo de Mortsel malfondiĝis antaŭ nelonge kaj ĝirtsian havaĵon al FEL. Poste Jan Bovendeerd komunikis ke tiu pago okazis erare, kaj ke la mono estis destinita por la Antverpena grupo. Intertempe la transpago al la konto de LVS jam okazis.

13. Jarkunveno: Kiel jam menciite povos okazi vizitoj al la Esperanto-centro en Antverpeno la 10an de marto inter la 13a kaj 15a horo. Eblas sperti la funkciadon de la centro, starigi demandojn, rampi en la malhelejon, ktp. Dum la samaj du horoj estos malforma la libroservo sub gvidado de Alex Humet kaj la bufedo. Je la 14a 30 tiuj kiuj ne ŝatas ĉeesti la jarkunsidon povas promeni en la urbo sub lerta gvidado de Dirk de Weerd. Je la

15a precize komenciĝos la jarkunveno kun:

⊖ financaj rezultoj 1989

⊖ buĝeto por 1990

⊖ sekretaria raporto 1989

⊖ elekto de administrantoj, estraranoj, prezidanto

⊖ informoj pri la nova subvenci-sistemo.

Post la jarkunsido ekzistas la ebleco por manĝi en la domo. Manĝemuloj bv. anonci sin antaŭ la 5a de marto, prefere skribe, al FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

14. Esperanto-centroj: Laŭ la CO la kunveno de la gvidantoj de la diversaj Esperanto-centroj baldaŭ okazos. Ni tamen ĝis nun ne ricevis respondon al la starigitaj demandoj. Decido ĉu partopreni aŭ ne estos farita dum la marta kunveno.

2a Instrutago por instruantoj-instruistoj

Matena programo : La metodo de Dennis Keefe en praktiko.

Ĉeestis : Iwona Kocieba k Jan Vanuytven (Antverpeno), Héleine Falk k Phillipe Van Damme (Bruselo), Ady Van Holder, Lucien De Sutter k Raimond Steenhout (Bruselo-Fervojistoj), Renée Oost (Halle), Jean Pierre Allewaert k Jan Hanssens (Kortrijk), Marie Grela (Welkenraedt) kaj Reza Kheir-Khah (Tehrano - Irano).

Senkulpigis sin : Katja Lödör (Gent) k Bert Boon (Lovenjo).

Alex Humet klarigis kiel uzi la metodojn BEK (Baza Esperanto-Kurso) de D Keefe, kiu konsistas el 4 partoj (B1 ĝis B4).

D Keefe ordigis dekojn da Esperantaj gramatikeroj en tiel nomata Konceptaro. Ĉiun koncepton akompanas demandaro, kiun ni uzos por la praktikado. Entute la kurso konsistas el centoj da demandaroj kun pli ol mil demandoj, 40 folioj por vortostudo, 24 ekzamenetoj k 20 hejmtaskoj.

Ĉar D Keefe ne verkis klarigojn, por kelkaj povas esti malfacile ekuzi lian metodojn. (Por ĉiu demandaro Alex surpaperigos tiujn klarigojn por la venonta lernojaro). Tamen la ideo de la kurso estas simpla.

Tradicia instrumentado baziĝas sur la pli-malpli daŭra komunikado kaj interŝanĝo de instruisto kun gelernantoj. Ni diru ke instruisto mem eluzas almenaŭ duonon de la tempo, kaj ke la tempo por ĉiu lernanto estas inverse proporcia al la nombro de gelernantoj. Ekzemple, se la kurso daŭras 1 horon kaj estas 6 gelernantoj, duonan horon parolas / "instruas" la isto kaj nur po 5 minutoj povas paroli ĉiu lernanto!!

Per la metodo Keefe, la instruisto trionigas sian tempon, kaj tiel la gelernantoj ricevas la ceteran tempon por praktiki inter si. La praktikado ne estas hazarda sed "programita". La demandoj jam estas pretaj, ĉar la intenco estas lerni aŭtomate kompreni "normalajn" frazojn kaj aŭtomate respondi. Post la leciono la gelernantoj tiomfoje aŭdis similajn demandojn (k respondis) ke ili tiam ankaŭ povas mem aktive starigi similajn demandojn.

KONCEPTO - INSTRUO - PRAKTIKO

Tiu trio resumas la metodojn Keefe. Por ĉiu ero ni diferencigas la koncepton mem el ĝia instruo (tre gravas ke la instruisto konsciu pri la grado de malfacileco de la diversaj konceptoj).

KONCEPTARO

60 erojn enhavas la konceptaro de Keefe. Jen ekzemple la unuaj konceptoj de la kurso B1 :

1. Saluton! (Bonan vesperon!) Kiel vi nomiĝas? Kiel vi fartas? ĝis revido!
2. Ĉu : Jes - Ne
3. Ĉu ... aŭ ... ?
4. Tio - Tiu
5. Ĉu tio - ĉu tiu
6. Kio - Kiu
7. Sur, sub, super, (mal)dekstre de, inter, en.
8. -oj (Numeroj de 1 ĝis 10)

9. Kie - Kiom da
10. -a / -aj
11. Kia - Kiaj
12. Bonvolu doni al mi (panoN). Dankon. Nedankinde.
Ĉu vi deziras ...N

B1 pritraktas la ankaŭ nomatan elementan Esperanton.

B2 okupiĝas pri ĉiuj relativaj frazoj : (la tramo, kiu venas... la urbo, kie ŝi loĝas... la pano, kiun vi mangas...)

B3 traktas komplete ĉiujn ig- kaj ig-kombinojn (efike al a- o- kaj 1-vortoj (transitivaj kaj netransitivaj)).

B4 instruas ĉiujn participojn laŭ jena principo : Demando : Kiu estas naskanta virino ? Respondo : Naskanta virino estas virino kiu naskas. D: Kio estas naskita infano? R: Naskita infano estas infano kiun oni naskis.

INSTRUADO

Ĉiu koncepto devas esti instruata laŭ la metodo preferita de la instruisto (rekta, traduka metodo ktp)*. Daŭro 1 - 5 minutoj. Ekz. se vi instruas "Ĉu", vi povas tion fari per kontrastigo de pozitivaj kaj demandaj frazoj, aŭ simple vi povas diri en la lingvo de la lernantoj : Por demandi en Esperanto ni uzas "Ĉu".

* (Pro tio la metodo Keefe povas esti ankaŭ uzata kiel kompletiga materialo por la praktikado kaj paroligo).

PRAKTIKADO

Tuj venas la praktikado kiu okazas laŭ la jena skemo :

1. I - L (Instruisto - lernanto)
2. L - L (Lernanto - lernanto)
3. L - L - L (Lernanto - lernantoj /grupa praktiko)

I - L

instruisto pri-demandas elektitan lernanton dum 5 - 10 minutoj laŭ la preta demando. Tiu ne timu respondi. Prefere ne elektu malbonan lernanton, ĉar vi havos la dilemon ĉu korekti la erarojn publike kio senkuraĝigos la lernanton aŭ simple ne korekti. Elektu ĉiam almenaŭ mezbonan, sed plej gravas lia kuraĝo.

Post la demando ĉiu povas unufoje preni la demando-folion kaj legi ĝin (ĝis tiam ili nur aŭskultis). Se vi volas vi povas kune legi la demaron por ekzerci la prononcadon kaj encerbigi la gravajn sonojn de la leciono (vi devas nur insisti pri tiuj gravaj, korektadon de aliaj vi faros poste ĉe la grupoj). (ĝis 5 minutoj).

L - L

Lernanto demandas lernanton, kiel antaŭe faris la instruisto. Demandato ne povas vidi la demandojn, nur aŭskulti. (5 - 10 minutoj).

L - L - L

La gelnantoj grupiĝas tri- kvar- maksimume kvin-ope. En ĉiu grupo ili demandas laŭvice, kiel antaŭe faris la instruisto. La unuan rondon la demandantoj rajtas rigardi la folion. La duan kaj eventuale trian rondon vi klopodu ke la gelnantoj respondu sen rigardi la folion. (20 - 30 minutoj).

Dum la gelnantoj demandadas inter si, la instruisto aŭskultas tra la diversaj grupoj, notas erarojn (ne ĉiam tuj korektas - ĝenerale la gelnantoj mem korektas unu la aliajn, kio plej efikas; por tio miksu bonajn kun ne tiom bonaj gelnantoj). Se vi korektas faru tion sen malkuraĝigi la lernanton, kaj nur se la eraro rilatas al ĵus traktata aŭ pli frua koncepto.

PRATIKA PRAKTIKO

Ekzistas alia modelo de praktiko, ni diru P2 kiu funkcias laŭ la jena skemo :

I : La instruisto priskribas iun situacion.

L : Elektita lernanto imitas la instruiston.

GRUPE : En ĉiu grupo ĉiu lernanto laŭvice imitas la instruiston.
La kolegoj aktive kontrolas la erarojn.

La plej konata ekzemplo de P2 estas la jena priskribo, kiun ĉiu lernanto devas komprene parkere ripeti. Ĝi estas tre bona por ekzerci la o/a finaĵojn (o, oĵ, on, ojn, a, aĵ, an, ajn). Jen ĝi :

Instruisto aŭ lernanto rigardas siajn vestaĵojn kaj priskribas ilin ilin montrante :

"Mia ĉemizo (bluzo aŭ pulovero) estas blanka (aŭ blua aŭ...)
Mia pantalono (ĵupo, robo) estas bruna.
Miaj ŝuoj estas nigraj".

Kaj denove sed kun akuzativo :

"Vi surhavas blankan ĉemizon.
Vi surhavas brunan pantalonon.
Vi surhavas nigrajn ŝuojn".

Li mem rigardas kolegon kaj ripetas la samajn strukturojn :

"Via ĉemizo estas blua.
Via pantalono estas griza.
Viaj ŝuoj estas brunaj".

Kaj akuzative, ĉiam montrante :

"Vi surhavas bluan ĉemizon.
Vi surhavas grizan pantalonon.
Vi surhavas brunajn ŝuojn".

Bonvolu noti ke kvankam la kurso estas baze gramatika, ni ne nepre devas gramatike instrui la gelernantojn. Ili ja lernas per imitado, ripetado kaj kontrastigo de situacioj !!

- - - - -

Kelkaj partoprenintoj ekuzos la kurson venontjare, ĉu plene ĉu kompletige, Tial ni havos la okazon dum estonta studo-tago pli profunde esplori pri la Keefe-metodo.

Plano ĝis 1a de septembro 1990 :

1. Enkomputiligo de B3 kaj B4
2. Surbendigo de B1 kaj B2 (utila por memlernantoj kaj blinduloj)
3. Verkado de enkonduko al ĉiu demandaro.

Unusola homo malfacile povas fari tion kromlabore. Ĉu vi povas helpi?

Ĉiuj interesitoj bv kontakti Alex Humet, adreso surkovriite.

Postagmeza programo :

La metodo Petro De Smedt aŭ Kurso - Kurso - Kurso - Kurso aŭ postfakta teoriizado de multjara kursgvidanto.

Krome ĉeestis : S-ro Delforge (Charleroi) k Andre Staes (Antwerpen).

Petro De Smedt tuj aludis la malfrueton kiun la antaŭa preleganto okazigis al lia prelego.

Ĉar ĝustatempeco (kaj komenca kaj fina) de ĉiu leciono estas unua kondiĉo por sukcesa kurso de Esperanto.

Es regulo por mezuri la sukceson de lingva kurso :

1. Ĉu vi perdis gelernantojn.
2. Kiun lingvan nivelon vi atingis.

(Se vi perdas gelernantojn ne serĉu la kaŭzojn en la lingvo kiun vi instruas aŭ en la lernolibro, sed en vi mem! - Kaj same pri la akirita lingva nivelo).

Dua kondiĉo por sukceso estas severeco. Petro estas tre severa kun la gelernantoj. Li konsciigas al ili, ke ili ekhavas ion valoran, tre valoran, sed ke ili neniel povos tion akiri nenion farante. Ĉiu el ili devas meti Esperanton inter siaj prioritatoj kaj agi laŭe.

Petro instruas dum 15 semajnoj, prefere sinsekvaj por eviti lernanto-perdigajn feriojn. Ĉiu leciono estas du-hora, kaj dum ĝi ili laboras laŭ la lernolibro "La komencanto", ili legas kaj komentas literaturajojn kaj havas ankaŭ la okazon konversacii praktike kun samklasano.

LA KOMENCANTO

Petro uzas tiun lernolibron pro jenaj kialoj :

1. Ĝi enhavas la tutan gramatikon.
2. Ĝi uzas ĉ. 1500 vortojn (se vi forgesas duonon de tio kion vi lernis, vi posedos tiam ĉ. 800 bezonatajn radikojn por paroli Esperanton).

Ĉiusemajne la gelernantoj devas hejme parkere studi ĉ. 120 vortojn, kiujn ili uzos dum la sekvanta leciono. Komence de ĉiu leciono la gelernantoj havas ekzameneton de la lernitaj vortoj. Ĉiu devas traduki Esperante 10 nederlandajn vortojn, kaj laŭ la rezulto ricevas poentojn, kiuj sumiĝos je la fina poentaro. 80 % je tiu ekzameneto estas malsukceso.

La gelernantoj ankaŭ preparis hejme Esperantan tradukon de nederlandaj frazoj el La Komencanto. Dum la leciono ili havas la okazon testi siajn kapablojn. Tamen ili ne ricevas poentojn je tiu laboro, por eviti kopiadon. La uzataj vortoj estas tiuj lernitaj dum la semajno.

Post tiu tasko unu post la alia tradukas nederlande Esperantajn frazojn, ankaŭ el La Komencanto. Tiu tradukado estas tre utila pro la

mallongeco de la kurso, kaj pro la fakto ke la lernantoj daŭre restas en propra nederland-lingva medio. Rimarku ankaŭ ke la lernantoj studis post la kurso la tutan Esperanto-gramatikon. (La komencanto ja ne sufiĉe atentis la korelativojn, sed Petro preparis specialan akompanan broŝuron kun kelkcentoj da frazoj, kiuj traktas ĉiujn eblecojn).

SURPRIZO

Grava parto de la kurso de Petro estas ankaŭ la surprizo. Ĉiu instruisto devus zorgi pri tio. Ĉefe temas pri poemoj kaj literaturaj tekstoj kiujn Petro kaj la lernantoj legas kaj prikomentas. De la komenco de la kurso la lernantoj ekhavas la senton ke Esperanto estas natura lingvo kiu ie ĉion povas esprimi kaj ĝe faras tion laŭ tre bona kaj harmonia maniero.

Estas regulo pri la surprizo : Tiu kiu ne venas ne plu ricevas la foliojn de la instruisto.

KURAGIGO

Ankaŭ la kuragigo al la lernantoj dum la kurso-tempo estas tre grava. Ĝiusemajne ĉiu lernanto ricevas cirkul-leteron, en normala Esperanto (ankaŭ Petro parolas dum la kurso en normala Esperanto, do tute ne mal-r-a-p-i-d-a). Ofte akompanas la cirkulaĵon aldonaj kuragigaj vortoj de Petro, ĉefe por tiuj kiuj troviĝas en malfacila periodo -ja dum ĉiu kurso lernanto ekhavas tion, kio plej ofte perdiĝas lin el la kurso se ni nenion faras.

EKZAMENO

Fine de la kurso estas ekzameno sub kontrolo de spertaj esperantistoj, prefere eksterlandaj, ankaŭ en la lastaj jaroj de universitata profesoro de lingvistiko, kaj skabeno de kulturo.

La ekzameno konsistas el skriba, parola kaj traduka partoj. Por la skriba li ricevas tradukotajn frazojn de La Komencanto. La parolan li faras kun la esperantistaj gastoj, kaj la tradukan kun la profesoro. Tiu lasta donas nederlandan frazon al Petro, kiu Esperante tradukas ĝin kaj laŭt-voĉas al la ekzamenato. Tiu retradukas nederlande, kaj la profesoro povas taksii la kapablojn kaj de la lernanto kaj de Esperanto por redoni la originajn nuancojn en la nederlandaj frazoj.

Krome kiel dirite aldoniĝas al la rezulto la poentaro dumkurso.

Interesitoj kontaktu Petron :

Petro De Smedt, Hemeistr. 44, 9330 Dendermonde, Tel. 052/21 26 77

(Protokolis Alex Humet, ne laŭvorte sed laŭsence).

SOCIETO KONTRAŬ TELEVIZIO?

Antaŭ la klubvespero de La Verda Stelo, mi firme decidis: "Ĉi-foje mi volas frue reveni hejmen. Mi jam estas laca. Morgaŭ okazos studotago de FEL kaj mi nepre ŝatas partopreni ĝin plene energie." Sed kiam mi estis forironta el la klubejo, je la 23a envenis mia amiko Raymond Gerard. Mi ĉiufoje ĝuas konversacion kun li. Plejofte ni havas kontraŭajn opiniojn. Sed li estas tiom ideorika, tiom originala, tiom neatendite prita ke mi ĉiufoje surpriziĝas. Ankaŭ kiam li parolas metafore aŭ ironie, mi ĝenerale tuj komprenas lin kaj mi supozas ke tio ankaŭ validas inverse. Mi do restis kaj ... finfine enlitiĝis je la la. Sed mi ne bedaŭris tion, eĉ ne la venontan matenon! Strange ĉu ne? Ĉu klarigebla? Mi provas.

Homo bezonas kontaktojn por vivteni sin. La bezono je kontaktoj estas eĉ pli granda ol la bezono je manĝoj. Homoj, kiuj sentas sin ege solecaj fariĝas malfeliĉaj kaj rapide maljuniĝas kaj kadukiĝas. Homo en izolĉelo pli rapide freneziĝas ol manĝstrikanto malsaniĝas. Por eviti miskomprenon, mi aldonu ke izolĉelo kiel torturejo ne estas komparebla kun la vivo en severa monaĥejo, kie la monaĥoj konservas multe da kontakto kun la naturo kaj apertas multe da komuna vivo en la praktikado de sia religio.

El psikologia vidpunkto oni distingas 6 eblecojn por pasigi la tempon. De 1 ĝis 6 ili donas pli kaj pli intensan homan kontakton kaj do pli kaj pli kontentigas niajn bezonojn. Tamen, same kiel pri manĝaĵoj, ne taŭgas manĝi nur la plej nutriganj aferojn; ni bezonas iom da ĉio. La 6 eblecoj estas:

1. Retiriĝi; ekz. sidi sola sur benko en la parko.
2. Ritoj = ĉiutagaj rutinaĵoj; ekz. saluti konatojn, "Kiel vi fartas", "Bona vetero ĉu ne".
3. Tempopasigiloj ekz. kartludi, babili pri la modo, la ferioj, ktp.
4. Laboro; la esenca diferenco inter tempopasigilo kaj laboro troviĝas en tio, ke oni laboras por atingi difinitan celon.
5. Psikologiaj ludoj; mi jam verkis apartan artikolon pri psikologiaj ludoj. La priskribo estas iom longe. Sed ekzistas facila metodo por detekti ĝin: se homaj kontaktoj postlasas malagrablan senton ĉe ambaŭ partioj, tiam preskaŭ certe okazis psikologia ludo. Psikologia ludo povas esti kverelo, sed ankaŭ primokado aŭ eĉ paŭtado aŭ ignorado de partnero.
6. Intimeco = aŭtenta, sincera rilato, kiam la homoj fidas kaj akceptas unu la alian. En tiu-ĉi senco, seksa rilato povas esti intima, sed ofte ĝi ne estas tia. Multaj geedzaj paroj suferas pro manko da intimeco. La sekvo de intimeco estas sento de kontenteco, refortiĝo, nova energio.

Se vi provas kompari tiujn kategoriojn kun viaj spertoj, vi sendube malkovros ke vi povas ludi per tiuj 6 kategorioj: en la praktiko ili interplektiĝas. Se vi komencas revidi, vi povas retiriĝi meze de amaso da homoj. Ofte la deĵoro estas tempopasigilo, sed arda kartludanto eble volas atingi difintan celon. Kaj en ordinara konversacio kutime estas iom de ritoj, iom da tempopasigilo, povas esti momento de laboro, psikologia ludo kaj ankaŭ momento de intimito.

Multaj homoj nuntempe plendas ke la deĵoro estas ŝtreĝiga kaj malagraba. Tio signalas ke la rilatoj inter deĵorantoj svarmas je psikologiaj ludoj: ege maloftas aŭ komplete mankas momentoj kiam deĵoranto povas kaj kuraĝas eligi siajn pensojn, siajn zorgojn, siajn suferojn. Feliĉe la moderna tekniko havigis al ni aparaton por artefarite krei etoson de intimito. En la plimulto de la televiziaj programoj laca homo povas identigi sin kun la heroo. Se la rilato kun la rolantoj malplacigas oni povas eĉ sendanĝere forpeli ilin kaj serĉi ion alian. Oni povas senĝene eligi sian admiron, sian abomenon, imagi sin supera al tiuj "stultuloj" en la televizio. Por multaj elĉerpitaj homoj, rigardi televizion estas la nura surogata metodo por trovi iom da intimito. Sed televizio ne povas havigi la intensecon de vera intimito.

Mi pli kaj pli malkovras, ke ankaŭ en societoj abundas la psikologiaj ludoj. Ĝis la malkovro de televizio, ili tamen havis gravan rolon en la socio kiel loko de homaj kontaktoj. Sed estas tute evidente, ke nuntempe, kiam la plimulto de la homoj jam tiom suferas pro nenatura konduto en sia laboro, ne plu volas subiri la saman en sia libera tempo kaj preferas fuĝi antaŭ sia televizio. Societo povas ankoraŭ havi rolon kiam ĝi fariĝas ejo por aŭtentaj, sinceraj kontaktoj. Nun vi supozeble argumentas ke gvidanto de loka klubo ne povas malhelpi se estas aliaj membroj, kiuj primokas, insultas, incitas aŭ malhumiligas iujn. Mi estas tamen konvinkita - pro pli kaj pli da spertoj - ke ablas neutralizi multajn psikologiajn ludojn kaj influi al etoso de malfermiteco, kompreno kaj sincera amikeco. Por atingi tion unue necesas konsciiĝi pri la ludoj, necesas konsciiĝi ke ekzistas io kio pli kontentigas. Se la konkurenco de la televizio povas influi nin en tiun direkton, ni povas konsideri ĝin kiel bonon!